## KER - Raporto pri partopreno en eventoj

- **Nomo:** Veronika Poór
- **Titolo de la evento: CoMem, EĜA**
- **Organizanto(j): FoJE**
- **Tipo de evento:** statuta kunveno
- **Datoj kaj loko:** 21-24 de novembro 2013, Tesaloniko Grekio
- **Partoprenis oficiale kiel reprezentanto de TEJO: JES/NE**

**Priskribo de la evento.** *(donu informojn pri la programo, la partoprenantoj, la kadro en kiu ĝi okazis, kaj ĉio kion vi taksas relevanta)*

La 21-an de novembro estis foiro en Tesaloniko, kie TEJO havis budon, poste estis la anonco de la junulara ĉefurbo 2016. La foiron partoprenis multe da grekoj, kaj la lingva problemo sperteblis ĉie.
La 22-an de novembro estis pluraj babiladoj kaj en la interŝanĝa grupo kaj estis la politikaj dokumentoj.
La 23-an de novembro estis renkontiĝo kun la AC membroj kaj la temaj kunvenoj kaj la longega voĉdonado pri la statutaj ŝanĝoj.

La partoprenantoj (ĉ. 100-200) estas ofte studentoj de politiko, ekonomio kaj internaciaj rilatoj, estontaj politikistoj, venas de tuta Eŭropo, ofte jam konas unu la alian.

**Kiel vi taksas la eventon el la vidpunkto de la organizado?**

Ĝi estis bone organizita kompare al kutimaj FoJE eventoj.

**Kiuj estis viaj atendoj?** *(kial vi decidis partopreni, kiaspecan eventon vi atendis, … ?)*

Mi esperis renkonti novajn homojn, babili al ili pri TEJO eble formi kunlaboron.

**Kiel vi prepariĝis?** *(ĉu vi pretigis materialon/programeron, ĉu vi informiĝis pri la temo, ĉu vi ricevis subtenon de TEJO/helpon de aliaj homoj, ...?)*

Mi legis la dokumentojn kaj klopodis pretigi la novan delegiton de TEJO, Đivo Pulitika al la evento. Aldone por la budo estis pretigitaj la unustilaj informiloj de TEJO en 4 lingvoj kaj lingva kvizo kaj eta kvizo por provigi Esperanton. Donacoj (verdaj kandeletoj) estis provizitaj de la Kultura Esperanto Fondaĵo de Budapeŝto. Kontaktoj, DVDj estis provizitaj de TEJO. Antaŭ la kunveno ni ankaŭ havis skajpan renkontiĝon kun Francesco, Łukasz, MB, Đivo kaj mi.

**Ĉu la objektivoj de la evento estis plenumitaj? Ĉu viaj atendoj realiĝis?**

Parte. Mi ne sukcesis renkonti tiom da novaj homoj, verŝajne ne nur pro la multe da tempo elspezita por la interŝanĝa grupo, sed ankaŭ ĉar mi jam konas sufiĉe da homoj, kaj simple saluti ilin kaj babili kun ili pri la ĝeneralaj aferoj daŭras tro longe. Mi babilis kun Jure, sed li ne sukcesis trovi iun, kiu partoprenu JES, kaj mi devas konfesi ke mi ne multe premis.

**Kion vi gajnis el via partopreno, kaj kiel vi povas uzi la rezultojn en/ekster TEJO?** *(ĉu vi lernis ion, ĉu vi ekhavis novajn kontaktojn/ideojn, ĉu tiu-ĉi sperto povas esti utila al via agado, …?)*

Pri la budo mi vidis, ke la kvizoj bone sukcesis, kaj mi pensas ke tio estas certe daŭriginda tradicio de TEJO kaj ĝenerale Esperantaj budoj.

**Kromaj informoj aŭ komentoj, se vi havas:**

- pri strukturita dialogo
  - Antoine Mertzeisen rilate al kiel TEJO povus pli partopreni, kaj pri la plej bonaj praktikoj (mi diris ke TEJO havas MOjn sed ankaŭ aliras individuajn membrojn, kaj bonus havi eksteran gvidlinion pri plej bonaj praktikoj pri kiel kunigi la informojn, kiuj venas de malsimilaj fontoj). Li diris ke li bedaŭras ke ne estas bonaj informoj pri tio, la MOj de FoJE ĉiuj havas siajn proprajn procedojn, sed estas iu malnova dokumento, kaj li sendos al mi. (mi jam sendis al li memorigmesaĝon)
  - estas multe da skeptiko inter la MOj de FoJE kaj plurajminacis ke ili ne partoprenos ĝin se ne estas kelkaj ŝanĝoj
- trejnadmaterialoj
  - FoJE - kiel TEJO - planas disponigi trejnadmaterialojn por MOj, kaj ili baldaŭ pretos - Aleksanda de la estraro, kiu prizorgas tion, diris ke ili ankaŭ povas sendi trejniston - sed la financoj dependas, tamen MOj kontaktu ilin pri tio.
  - FoJE ŝatus havi informojn pri kiel funkcias/os la retaj trejnadoj de TEJO
- David de la dungitoj de FoJE, kiu kunordigas la aferon pri volontulaj rajtoj
  - tre dankis la helpon de TEJO, ke oni tradukis "Amu junularan estontecon" al la itala;
  - ĝenerale ili malfruas pri volontulaj rajtoj, sed estos io
- estas multe da primoko pri la “no hate speech”
- la Konsilio de Eŭropo estas en krizo, ne scias kial ili ekzistas...
- la junularaj rajtoj kiel FoJE volis ne povos funkcii “dum la estontaj 20 jaroj”
- interŝanĝaj organizoj
  - volas ke BEST estu inter ni, kaj la reprezentanto de BEST estis invitita partopreni
  - sukcesis bone lobii
  - kelkaj daŭre skeptikas pri TEJO kaj Esperanto
- organizoj por daŭripova evoluo (estas rekreata “prem”grupo pri tiu temo)
  - volas akcenti ĉefe la ekologian daŭripovon
- neregistara organizo kiu faras desegnofilmojn, desegnaĵojn addartngo@gmail.com
  - serĉas kunprojektumantojn - laŭ mi indus kun ili havi kontakton
- Marc el IFM-SEI
  - eble eblus ia kulaboro